
# ATEISMO

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo




N-ro 30 **http://ateisto.org** Majo 2020

# Vorto de la redaktoro

Ni trapasas eksterordinaran periodon, kiu ampleksas la tutan planedon. Neatendite, loka fenomeno en Ĉinio internaciiĝis, transoceaniĝis, tutmondiĝis. Ankaŭ neatendite, en la mezo de februaro, mi devis flugi al Usono pro urĝa familia san-afero. Tiam la unuaj kazoj de Kovido-19 aperis en Usono, sed ĝi ankoraŭ ne estis la ĉefa temo en usonaj amaskomunikiloj – la prezidenta elekto-kampanjo plej okupis ilian atenton.

Fluginte reen al Eŭropo (en nur trion-plena aviadilo), ĉe la flughaveno de Frankfurto, mi unuafoje vidis homojn portantajn maskojn kontraŭ la viruso, kaj povis pli forte senti, ke ni troviĝas en monda epidemia krizo. Du semajnojn poste, mia oficejo petis ĉiujn labori hejme, kaj tiun saman vesperon la ĉefministro de Pollando anoncis fermadon de la landlimoj (do, estis vere bonŝance, ke mi sukcesis flugi al Usono kaj reen) kaj diversajn aliajn limigojn – kaj iom poste maskoj fariĝis devigaj eksterhejme. Jen nova realo!

La pandemio tuŝis kaj daŭre tuŝas homojn ĉirkaŭ la mondo, kaŭzis grandan interrompon en la normala vivo. Homoj plejparte restis hejme, urboj plejparte fermiĝis, stratoj malpleniĝis, socia vivo kaj turismo haltis. Multaj planitaj eventoj estis nuligitaj aŭ prokrastitaj, inkluzive la Universalan Kongreson, kaj ene de ĝi la kunvenon de nia propra fak-asocio ATEO. Mi devis prokrasti planitan majan ferion en Italio kaj rezigni pri ĉeestado de la Montreala UK. (Okazos tamen Virtuala Kongreso, kie ATEO havos la okazon prezenti sin.)

Mi pensas, ke la krizo plene konfirmas la pravecon de nia ateisma, racia, sciencema sinteno. Tute indiferente al religioj, al supozate ĉiopova, bonfara Dio, al preĝado ĉu individua, ĉu amasa, la kronviruso disvastiĝas, malsanigas kaj mortigas – kaj religiaj amasiĝoj aparte favoras la transdonadon de la viruso. Ĝi estas natura fenomeno, sed samtempe homar-kaŭzita pro nia detruado de la naturmedio. Nur per scienco ni povas kompreni la viruson, kaj nur per scienco kaj scienc-bazita politiko ni povas ĝin kontraŭbatali. La vivoj de milionoj, inkluzive de religiuloj, dependas de scienco. La tutmondaj fermiĝoj celantaj la limigon de la virus-disvastiĝo, faritaj laŭ scienca scio, ankaŭ kromefike multe malpliigis emisiojn de $CO_2$, do ili montris la vojon irendan por haltigi klimat-ŝanĝon. Religio, kredo je Dio, preĝado ne helpos al ni venki la viruson, nek ripari la naturmedion kaj savi nian planedon.

# Dio, religio kaj la kronvirusa pandemio

Por la antaŭa numero de la bulteno, antaŭ ol la mondo aŭdis pri la nova kronviruso, mi verkis la artikolon "Fido kaj dankemo fronte al amasaj malfeliĉaĵoj". Tiu artikolo fokusiĝis je pestoj en la 14a, 16a kaj 17a jarcentoj, speciale rilate al Venecio, kaj montris kiel postvivintoj reagis dankeme al Dio, Jezuo kaj la Virgulino Maria. Mi tute ne supozis, ke jam antaŭ la sekvonta numero nova epidemio atakos la homaron kaj kaŭzos eble la plej grandan tutmondan krizon en la historio!

La virusa mortosumo kreskas je miloj ĉiutage. Kie estas la protekta, bonintenca Dio?

La 27an de marto ĉi-jare, la Papo aperis sole sub ŝirmilo en tute malplena, fermita al la publiko Placo Sankta Petro en Romo por fari eksterordinaran benon *Urbi et Orbi* ("Al la urbo kaj al la mondo") – normale li faras tion nur kristnaske kaj paske. Certe por katolikoj ĝi estis kortuŝa, sed el ateisma vidpunkto ĝi bone simbolas la plenan senpovon de religio fronte al la kronvirusa pandemio.

Kiel en ĉiu malfacila periodo, religioj ja povas doni komforton, konsolon kaj esperon al kredantoj en tiu ĉi krizo. Kaj kiel post ĉiu mortdanĝera okazaĵo, kredantoj dankas al Dio se ili aŭ homoj proksimaj al ili postvivas la teruran malsanon Kovido-19 kaŭzita de la kronviruso, foje estinte ĉe la sojlo de morto. Jes, multaj postvivas tiun malsanon, ĉu sufiĉe sensufere ĉu sufere. Tamen, multaj aliaj mortas, ĉiam post suferegado – jam pli ol 180,000 kiam mi skribas ĉi tion, sed antaŭ aperigo de la bulteno, verŝajne multe pli. Do, oni devas demandi: Kie estas Dio? Kial li permesas tiun epidemion? Kial li savas multajn sed lasas multajn aliajn morti? Ĉu li ne fakte kreis la viruson, kiel ĉiun alian vivaĵon? Se jes, kial li faris tion? Ĉu li ne respondecas pri la epidemio? Se ne, ĉu li ne povas haltigi ĝin? Aŭ ĉu li povas, sed ne deziras haltigi ĝin? Se li punas nin, kial li punas tiel arbitre? Aŭ ĉu li celas per la viruso ion alian, ekzemple plibonigi la naturan

medion per haltigado de homa aktivado, kaj ne atentas kiu mortas, kiom mortas? Se la epidemio estas la volo de Dio, ĉu ni eĉ rajtas haltigi ĝin?

Kiel ajn oni rigardas la aferon, religio kaj religioj montriĝas nur surbaze de dia volo, dia ago pro iu nekonata kaŭzo, aŭ pro deziro puni, aŭ pro celado al ia pli granda bono, sed kompreneble sen iaj ajn pruvoj. Eble nun en la pli evoluintaj okcidentaj landoj, oni ne tiom parolas pri la dia volo, sed en multaj landoj,



Papo Francisko sola en Placo Sankta Petro dum la pandemio.

(Foto de: Yara Nardi/ AFP)

plejparte senutilaj, senpovaj, senrespondaj, senklarigaj fronte al tiu ĉi mondskala krizo. Kredantoj povas nur preĝi kaj, se ili aŭ iliaj proksimuloj travivas aŭ evitas la malsanon, danki al Dio aŭ alia supernatura aŭ sankta estaĵo. Ili povas klarigi la aferon speciale islamaj, sed ankaŭ en Hindio, oni ofte klarigas malfeliĉaĵojn per la dia volo kaj tial ilin akceptas. Malbonaĵoj estante simple dia volo, eble dia puno, oni preĝu por provi ricevi iom da dia favoro, kaj danku se trafas nin ia bonaĵo en malbona

situacio. Sed religio ne povas kontraŭstari, nek haltigi la disvastiĝon de la kronviruso, ne povas analizi aŭ klarigi la evoluon de la pandemio, kaj ne povas trovi kuracon. Nur racia pensado kaj scienco povas fari ĉi ĉion.

Se oni argumentas ke Dio iamaniere subtenas homojn – ĉu flegistojn, kuracistojn, sciencistojn, pacientojn – en siaj bataloj kontraŭ la virus-malsano, tio evitas la demandon, kial ili troviĝas en tiu ĉi batalo? Kaj ni revenas al miaj pli fruaj demandoj. La fido certe helpas multajn homojn en malfacilaj situacioj. Tamen, ŝajnas ke la plimulto de religiemaj personoj ne tro pripensas la aferon. En kia Dio ili kredas? Ĉu Dio estas bonintenca rilate al la homaro? Ĉu Dio celas tion, kio estas bona por ĝi, laŭ ĝiaj propraj kriterioj? Aŭ ĉu tion, kio estas bona el dia perspektivo, eĉ se ĝi povus kaŭzi grandan suferadon al homoj? La religioj ĝenerale bildigas Dion kiel bonintencan rilate al ni, kiel kompateman, graceman, sed aliflanke ankaŭ kiel foje severan, puneman, defi-doneman eble por testi nian fidon. Homoj religiaj esperas, ke iel Dio protektas nin, helpas nin, zorgas pri ni. Tamen, la kronvirusa mortosumo kreskas je miloj ĉiutage. Kie estas la protekta, bonintenca Dio? Se Dio agas kun indiferento al homa bonfarto, por kio servas religioj?

Preĝado estas kutime grava parto de religia praktikado. Kial oni preĝas? Plejofte por peti ion bonan por si aŭ siaj proksimuloj, por peti helpon por eliri aŭ elirigi iu(j)n el iu malfacilaĵo. Verŝajne nun multaj preĝas por fino de la virus-krizo, por vakcino kontraŭ la viruso, por helpo se ili aŭ iliaj familianoj aŭ geamikoj estas forte malsanaj pro la viruso, aŭ simple por daŭra sano kaj evitado de infektiĝo. La tuta afero estas stranga: ĉu Dio jam ne scias, ke suferado estas io malbona por ni homoj, ke la teruraj pulmo-problemoj, kiujn povas porti Kovido-19 estas io ege suferiga kaj viv-endanĝeriga? Ĉu Dio jam ne scias, ke neniu deziras perdi sian patron aŭ edzinon aŭ infanon al iu malsano? Kial oni devas preĝi por ricevi dian helpon por malpliigi la suferadon kaj eliri el ĝi kaj resaniĝi? Aŭ por malpliigi la disvastiĝon de tiu ĉi plago? Se iuj resaniĝas, ĉu post aŭ sen preĝado, ĉu tio estas pro Dio? Kial aliaj ne postvivas, eĉ malgraŭ preĝado?

La kerna demando, do, por kredantoj en tiu ĉi nekredebla, tutmonda sankrizo, kiu paralizas

la ĉiutagan vivon de centoj da milionoj da homoj en ĉiuj kontinentoj, estas: *Kian sencon havas via religia kredo kaj via religio fronte al tiu ĉi krizo?* Ĉu la krizo ne klare montras, ke ekzistas kontraŭeco inter Dio bonintenca (al homaro) kaj Dio, kiu kaŭzas aŭ almenaŭ ne haltigas la virusan pandemion? Ĉu vi ne vidas, ke Dio ne haltigas la epidemion, ke nur homa agado (distancigado, kvarantenado, scienca esplorado kaj testado) povas fari tion? Aŭ oni kredu je iu arbitra, kaprica, indiferenta, strangekonduta Dio, la Dio de la religioj, aŭ oni kredu je la Dio de diismo, kiu kreis la universon sed ne agas en ĝi, aŭ oni tute ne kredu je Dio kaj akceptu sendian universon, sendian ekeston de la universo kaj naturon agantan laŭ siaj leĝoj science malkovreblaj.

**Nyegosh Dube (Pollando)**

## Ĉu la diablo ekzistas?

En la homa historio, ekde la pratempo, konkretiĝas abstraktaj konceptoj pri la dieco en ties diversaj formoj kiel bono, malbono, malfeliĉo, eventoj nenormalaj kaj supermirigaj. La homoj sentas bezonon prezenti tiajn konceptojn per uloj aŭ objektoj konkretaj. Do, ankaŭ la malbono estas prezentita per la diabla figuro, vorto indikanta etimologie estaĵon dividantan, kalumniantan. La diablo estas kaŭzanto de malpaco, misfarto, kaj de ĉio, kio ĉeestas en la regno de la malbono.

Eĉ malsanoj estas disdonataj de Dio por puni malbonan konduton. La misfortunoj, kiuj persekutadas la homojn, estas konsiderataj missorĉaj agoj fare de kontraŭuloj pli aŭ malpli konataj, kiuj utiligas sorĉajn artojn kiel ekzemple “la malican okulon”.

La religio transprenis ĉi tiun bezonon kaj kolektis temaron pri diabla figuro. Tio necesis por klarigi la mankojn de perfekta dieco, nekapabla erari aŭ krimi aŭ peki. Sekve ĉiaj malbonaj aferoj, kiel la morto, malfeliĉo, malsano, bataloj ktp. estas aljuĝeblaj al la diablo. Estas li kiu vekas en ni la bezonon de venĝo, de senbridaj deziroj, envio, malamo, plezuro pro alies suferado, kaj simile.

Kion entenas vere ĉi tiu mistera figuro kiu sekvas nin laŭ nia tuta vivofluo? Pli detala kompreno pri la sinsekvo de kaŭzo kaj rezulto nuligas la iaman bezonon personigi la sekvojn de nesciado en la agoj de nia ĉiutaga vivo. Kiam ni komprenas pri higieno, ekzemple, ni povas malhelpi malsanojn, kiujn antaŭe ni atribuis al la diablo.

religio. La menso de la gejunuloj devas gardi liberecon, flekseblecon kaj mensan malfermitecon, por ke ili pli bone akiru sciencajn sciigojn. Samtempe estas tre grava la edukado de la junaj lernantoj pri saĝa konduto, por instigi maksimuman respekton al ĉia vivoformo, kiu ekzistas apud ni sur nia planedo.

En lernejoj devus malĉeesti ĉia religia simbolo, kiel krucifiksoj, bildoj kaj statuoj de sanktuloj

Oni povas atingi la definitivan malaperon de la diabla figuro ne per esotera praktiko de ekzorco, kiel oni faris en la pasinteco, sed strebante senĉese al plilarĝigo de sia kompreno pri la mondo, sepultante ĉian antaŭjuĝon moralan aŭ religian.

Kiel praktike oni povas atingi tion? Unue, en lernejoj devus malĉeesti ĉia religia simbolo, kiel krucifiksoj, bildoj kaj statuoj de sanktuloj, kaj krome devus malaperi instruistoj pri




Fine, necesas konsideri la plagon de konsumismo, por reveni al pli naturaj vivostiloj. Kaj jen ĉeno de katastrofoj, kiujn ni bedaŭrinde devas nuntempe spekti dum ĝi detruas la mondon ĉirkaŭ ni.

Sume *homo sapiens* devas iĝi *homo ethicus*.

**Pino Lalli (Italio)**

# La ĉapelo

En tiu tempo, mi parolas nun pri la 1940-aj jaroj, preskaŭ ĉiuj portis ĉapelon. Mi memoras tion, ĉar mi estas jam tiel maljuna. La plej bela estis sendube apartenis al virbirdo tre eleganta, kiu volis konvinki in-seksan birdon sin submeti kiel edzinon por kune krei neston da junaj birdidoj. La virbirdo devis nur



Jean-Paul Belmondo kaj Alain Delon en la filmo “Borsalino”
(Foto el: Bridgeman Images)

‘Borsalino’. Ĝi estas eleganta kaj havis iun ŝikecon. Evidente mi parolas pri viroj, sed ankaŭ virinoj tiam portis ĉiam ĉapelon. Kutime ĝi surhavis plumaron. En la pli frua vivo de tiu plumaro, ĝi malfermi sian mirindan voston de koloraj plumoj por seksumi kun birdino.

Tio estis bela tempo, ĉar preĉipe dimanĉe, kiam okazis la sankta

meso, la virinoj kaj viroj iris al la pastro por aŭskulti, kion oni devas fari por esti bona katoliko. Poste la virinoj iris hejmen por prepari la tagmanĝon kaj la viroj restis en la trinkejo por – ja por kio? Estis tiel ĉiudimanĉe.

Papo Pio la 12a mortis kaj venis nova vento tra Romo. Venis Papo Johano la 23a (1958 - 1963), kiu multon ŝanĝis en la katolika eklezio. Sed por ni estis nur unu afero grava. La belaj ĉapeloj malaperis el la stratbildoj. Kune kun la latina muziko, malaperis la eleganteco de la homoj. Estis la komenco de la 1960-aj jaroj kaj ankaŭ tio ludis rolon en la afero. Ĉiu vagadis tra la stratoj kun la kapo senĉapela; ie kaj tie estis pia virino, kiu portis ankoraŭ plumaron, sed mi pensas, ke junaj birdoj ne plu volonte donis siajn vestojn.

Tio estis kvieta, trankvila tempo en la okcidenta mondo, ĉar neniu plu portis ĉapelon krom judaj virinoj kaj tiuj devis esti tre ortodoksaj. La judaj virinoj devis porti ĉapelon, por montri sian submetiĝon kaj al la edzo kaj ankaŭ al ilia dio. Mi laboris preskaŭ la tutan vivon por judaj estroj, sed ne konas la nomon de ilia dio. Eble ili nomas lin simple Dio, sed mi ne certas pri tio.

Sed iun momenton aperis en la stratbildo aliaj, precipe virinoj, kiuj surhavis ne ĉapelon, sed kaptukon. Tio ne ĝenis iun ajn, mi pensas, sed tuj aperis naciismaj politikaj partioj, kiuj protestis. Kaptuko, ili diris, estas malbonaĵo en nia lando kaj oni devis malpermesi ĝin. La afero iĝis eĉ pli grava, ĉar ili diris, ke la kaptuko devenas de alia kredo ol la nia, kaj ĝi estas malbona ĉar ĝi estas humiliga al la virinoj, kiuj estas devigataj meti tiujn kaptukojn laŭ ordono de la edzo kaj ankaŭ de ilia dio, kiu ne nomiĝas “Dio” sed Alaho. Inŝa’allah! Fakte “Deo volente” laŭ la katolika kredo.

Kaj kion pensas ateistoj pri tio? Mi fakte ne scias, ĉar mi konas nur unu personon tiel bone kiel mi konas min mem. Rilate al la aliaj, mi povas nur supozi, ke ili pensas same kiel mi. Mi jam perdis la kredon de mia junaĝo. Mi kredas nur je la scienca vero, kaj ne je Dio aŭ Alaho. Dum mallonga periodo mi pensis, ke estus ne malbone kredi je budhismo, sed parolinte kun kelkaj budhistoj, mi pensis: “tio ne estas mia taso da teo” (angla esprimo, sed mi esperas, ke vi komprenas). Do, mi preferas kredi je la scienca vero. La scienco agnoskas erarojn, forĵetas

malpruvitajn, malaktualajn teoriojn, kaj provas trovi novajn solvojn. Tion oni ne trovas en kredado, ĉu je Alaho, ĉu je Dio, ĉu je multeco da dioj.

Evidente mi iom bedaŭras, ke nun oni ne plu portas ĉapelojn, nek Borsalinojn nek plumarajn. Restas por iom da tempo kaptukoj, sed kiel longe oni portos ilin?

Kompreneble mi, kiu ne kredas je Dio, povas surhavi ĉapelon laŭvole. Mi posedas du, unu de kiam mi vizitis Usonon, kaj la alian de kiam mi vizitis Aŭstralion. De tempo al tempo mi metas unu el la du sur la kapon kaj iras promeni en la urbo, kiel fiera ateisto.

**Jakvo Schram (Belgio)**

## Kial Dio ne plenumas dezirojn

En la jaro 2016 sur la Tero vivis 7 442 000 000 homoj. Jaro havas 31 536 000 sekundojn. *(365 tagoj x 24 h. x 60 min. x 60 s. = 31 536 000 s.)* Pro tio mi konstatas, ke Dio povas destini al unu homo nur 0,004 s. jare. *(31 536 000 s ÷7 442 000 000 = 0,004 s.)*
Pro tio mi demandas ĉu Dio povas dum la tempo 0,004 s. aŭskulti preĝojn de iu homo?

Sankta meso daŭras meznombre 1 horon kaj sciante, ke kredanta homo partoprenas sanktan meson ĉiusemajne, la tempo de preĝoj plilongiĝas al 52 horoj jare. Ĉu Dio havas tiom da tempo por ĉiun aŭskulti? Probable en la pordegoj de la ĉielo staras dia helpanto Sankta Petro kaj zorgas ke bonuloj eniru la lokon. Taksante, ke mezuma vivo de homo surtere estas ĉirkaŭ 70 jaroj, oni povas pritaksi, ke meznombre jare mortas 106 314 285 personoj. *(7 442 000 000 ÷ 70 = 106 314 285)*. Pro tio Sankta Petro havas nur 0,3 s. por analizi la vivon de iu mortinta homo. (*31 536 000 s. ÷ 106 314 285 = 0,3 s.)*

Kompreneble la ĉi-supraj kalkuloj estas ĝustaj se nia premiso estas, ke Dio kaj lia helpanto Sankta Petro laboras kiel aŭtomatoj ne havante

paŭzojn dum la laboro. Do, ĉu ili havas ankoraŭ tempon por okupiĝi pri la cetero de la Universo? Mi dubas. Mi opinias, ke la homaro estas lasata sola en sia vivo kaj ke la homaro povas kalkuli nur je si mem.

Mi, kiel peceto de la Universo nekredanta je Dio, estas amata de Dio, ĉar mi neniam preĝas, pri nenio mi petas Dion. Pro mi Dio ne havas klopodojn kaj mi rekompence ricevas:
1) liberan tempon, ĉar dum kredantoj preĝas 52 h. jare mi havas tempon por aliaj aferoj (2 tagnoktoj). Do, se mi sukcesos ĝisvivi 70 jarojn, mi ŝparos 140 tagojn (ĉirkaŭ 4,5 monatojn).
2) monon, ĉar kiam kredantoj diversmaniere transdonas monon al diaj helpantoj surtere, mi ĝin ŝparas.

Mi povas konkludi, ke mi ricevas de Dio ne nur 4,5 monatojn por libertempi. Mi ankaŭ ricevas de Li monon por ke mi povu senzorge ĝui la libertempon.

**Sileziano (Pollando)**

## Humanisma funebro en la kronvirusa tempo

Mia patrino mortis antaŭ kelkaj semajnoj, la 31an de marto. Ne pro la viruso, kvankam ŝi ja loĝis en maljunulejo de dek kvar monatoj. Ne, bonŝance la viruso ne atingis ŝian hejmon. Ŝi mortis tutsimple pro maljuneco, je 97 jaroj.

Sed la viruso ja havis sekvojn. Ne estis permesate en ĉi tiu periodo organizi funebran ceremonion. Rajtis ĉeesti nur mi kaj mia edzo Renato, kaj eventuale religia gvidanto, sed ĉar mia patrino estis humanisto, religia gvidanto ne necesis.

Mi decidis, kune kun miaj du fratoj, ke ŝi estu enterigita en la tombejo tuj malantaŭ mia apartamentaro. Mia patro antaŭ 26 jaroj estis kremaciita, sed intertempe oni diras, ke enterigo estas pli ekologia metodo. La tombejo estas tre bela loko, kie mi kaj multaj aliaj homoj kutime iras ĉiutage por promeni aŭ kuri, kaj kie homoj ankaŭ promenigas siajn hundojn. (Nun pro la viruso, oni fermis ĝin al la

publiko, same kiel la parkojn.) Ĝi estas unu el la plej grandaj tombejoj en Britujo, kun regionoj preskaŭ forlasitaj, kie malnovaj tomboj el la 19a jarcento estas duone kaŝitaj inter arboj, hedero kaj kamparaj floroj. Almenaŭ parte ĝi estas natura rezervejo, kaj kiam mi promenas tie mi ofte vidas sciurojn kaj vulpojn.

En la tombejo troviĝas aparta sekcio, kiu nomiĝas "natura arbaro". En tiu sekcio oni ne rajtas starigi monumentojn el ŝtono aŭ metalo. Mi tamen vidis tie tre fortikajn "tomboŝtonojn" kaj aliajn monumentojn, faritajn el dika tavolo da ligno, kiu aspektas preskaŭ kiel ŝtono. Evidente ili iom post iom diseriĝos kaj fariĝos parto de la arbaro. Ni decidis, ke nia patrino estu enterigita en tiu sekcio.

Kaj nun aperis la problemo pri la ceremonio mem. Ni ne povis inviti la familion, ĉeestos nur mi kaj Renato, sed kiel ni du povos konvene adiaŭi mian patrinon? En normala tempo, ni estus organizintaj ceremonion, al kiuj ni invitus ĉiujn parencojn kaj geamikojn por honori la mortinton. Ekzemple ni invitus iun rakonti pri ŝia vivo, ni aŭdigus ŝian plej amatan muzikon, laŭtlegus unu el ŝiaj verkoj (ŝi estis profesia verkisto). Aliflanke tia ceremonio bezonas pli ol nur du ĉeestantojn. Fari tion nur inter mi kaj Renato ne havus sencon, kaj verdire ŝajnus al mi iom ridinde.

Mia patrino estis humanisto. Ŝi iam estis sufiĉe aktiva, kaj antaŭ kvindek jaroj ŝi eĉ mem fondis lokan sekcion de Brita Humanisma Asocio. Dum la lastaj jaroj ŝi ofte diris tre firme, ke ŝi ne kredas je Dio, kaj ke ekzistas nenio post la morto. Samtempe tio ne malhelpis ŝin esti tre konscia pri sia juda origino. Apenaŭ eblus forgesi tion, ĉar mia patro estis rifuĝinto el Germanujo tuj antaŭ la Dua Mondmilito, kaj ankaŭ la geavoj de mia patrino venis al Britujo kiel rifuĝintoj el Rumanujo kaj Litovujo en la 19a jarcento. Ilia bezono fuĝi estis eventuale malpli urĝa ol tiu de mia patro, sed tamen reala, pro la teruraj kondiĉoj por judoj en tiuj landoj.

Kaj do, kiel organizi funebran ceremonion, kiam ĉeestas nur du homoj? Mi sentis, ke necesas io. En tia momento oni bezonas ian ceremonion – ne sufiĉas simple meti la ĉerkon en la grundon. Mi konstatis, ke religioj havas siajn ritojn, sed nekredantoj ne havas



Tombo en la arbara sekcio de la tombejo. La “tomboŝtono” estas farita el ligno.

(Foto de la aŭtoro)

pretan formulon, kaj tio mankas en tia situacio.

Finfine mi havis la ideon peti mian nevon kanti Kadiŝon. Tio estas juda preĝo por la mortinto, en la aramea lingvo. Ŝajnas strange citi preĝon okaze de humanisma funebro, sed mi vidis tion ne kiel religian geston (ĉar efektive nek mia patrino nek iu ajn el miaj proksimaj parencoj estas kredantoj), sed kiel memorigon pri nia juda heredaĵo, kiu estis tre grava al mia patrino. Ankaŭ kiam mia patro mortis, mia frato citis Kadiŝon por konkludi la nereligian ceremonion.

Ĉar mia nevo (la nepo de mia patrino) estas profesia kantisto, mi telefonis al li en Israelo por proponi al li tiun ideon. Li entuziasme konsentis, kaj sekve ni organizis kunvenon per Zoom, pri kiu mi sufiĉe spertiĝis dum tiu periodo. Ne plu la ĉeestantoj estos nur mi kaj Renato, ĉar per Zoom ni povos inviti geamikojn kaj parencojn, kion ni antaŭe ne planis fari. Kaj do subite la ceremonio akiris tute alian karakteron.

Finfine do, en la koncerna tago mi kaj Renato iris al la natur-arbara regiono de la tombejo. Per mia poŝtelefono ni kontaktis

ĉiujn parencojn kaj geamikojn de mia patrino en Zoom, kaj montris al ili la lokon. Ni ne planis formalan ceremonion, sed anstataŭe ni invitis ĉiujn rakonti siajn memorojn pri ŝi. En la fino mi nevo kantis Kadiŝon, kio estis tre bela kaj kortuŝa momento. Kaj tiel do finiĝis nia humanisma ceremonio, kiu daŭris ĉirkaŭ 40 minutojn.

Ĝi estis neformale kaj eĉ iom haste organizita, ĉar la ideo venis nur lastmomente. Tial ni ankoraŭ planas, kiam la nuna krizo finiĝos kaj la homoj rajtos denove renkontiĝi en publikaj lokoj, organizi pli formalan kunvenon memore al mia patrino. Mi komencas timi, ke pasos almenaŭ unu jaro antaŭ ol tio fariĝos ebla.

Eblas dungi "ceremoniiston", kiu helpas la homojn organizi nereligian ceremonion – fakte aperis artikolo de tia ceremoniisto en n-ro 27 de nia bulteno. Mia ĵusa sperto sugestas al mi, ke utilus ia preta formulo por laikaj funebraj ceremonioj, same kiel ekzistas por religiaj.

**Anna Lowenstein (Britio)**

# Laikaj festoj kaj d-ro Ambedkar

Dum la kronvirusa pandemio, spertante la socian distancigadon, kiu instigas nin provizore trakti aliulojn kiel netuŝeblajn, estas nature ke ni kiuj loĝas en Barato tuj pensu pri la groteskaj praktikoj en la hinduismo, kiujn oni nomas "la netuŝebleco". La "altkastaj hinduoj" – do tuta piramido da kastoj rigardantaj sin kiel purajn – tenas sub la piramido la "netuŝeblajn" kastojn. PIV nomis ilin "parioj"; la nuntempa barata socio uzas la terminon "dalitoj" (https://eo.wikipedia.org/wiki/Dalito). Kastaj hinduoj, kiuj kontraŭregule tuŝas la dalitojn havas la ritan devon sin bani por elveni el la poluciiĝo. Ĉi tiujn arkaikiĝintajn firegulojn ne plu observas la urbanoj, sed la plimulto de la kamparanoj jes, malgraŭ juraj klopodoj estingi la netuŝebleco-praktikojn.

Tiuj juraj klopodoj prenis potencan formon en la konstitucio de Barato adoptita en 1950. Tiun ampleksan konstitucion verkis komisiono

gvidata de la dalita intelektulo d-ro B.R. Ambedkar (https://eo.wikipedia.org/wiki/Bhimrao_Ramji_Ambedkar). Plene konscia, ke la juraj klopodoj restos senenhavaj se la socio kaj la koroj ne ŝanĝiĝos, li faradis fortostreĉojn por lanĉi kulturtransforman procezon. Ambedkar estis ateisto, kiu tamen kredis ke en la religio-ĉefigaj komunumoj de Barato eĉ avangarda movado por elkatenigi la dalitojn devos alparoli la homojn per idiomo religia. Post funda trastudo de la eblaj religioj, li elektis la budhismon pro ĝia sendieco. Verkinte ampleksan libron por klarigi siajn ideojn (*La Budho kaj lia darmo*), Ambedkar en 1956, kune kun granda sekvantaro, aliĝis al la budhismo. De post lia morto, pli kaj pli da dalitoj en Barato konvertiĝas al tiu religio. Ankaŭ la surpapere hinduaj dalitoj en la gubernio Maharaŝtro (kie Ambedkar vivis kaj kampanjis) – kaj ĉiam pli da dalitoj alilokaj – partoprenas la festojn lanĉitajn de la ambedkaraj budhanoj.

## Post funda trastudo de la eblaj religioj, li elektis la budhismon pro ĝia sendieco

Temas do pri festoj parte ligitaj al la adopto de la budhismo fare de la ambedkara movado. Sed ili estas laikaj en la senco ke ili rilatas al la historia heredaĵo de lia kampanjo por la socikultura reformo de la etoso, kiu nutras la netuŝeblecon. Sur la ambedkarisma kalendaro reliefas kvin datoj. La 1-an de januaro la dalitaj celebrantoj vizitas la urbeton Bhima-Koregaon kaj rememoras, ke tiun tagon, en 1818, armeo da dalitaj soldatoj, aliance kun la britoj, faligis altkastan hinduan regnon kaj inaŭguris la modernan epokon en la okcidenta Barato. La 14an de aprilo, la respubliko de Barato formale celebras la naskiĝdatrevenon de d-ro Ambedkar; la dalitoj ceremonias antaŭ statuoj de tiu granda gvidanto de la komunumo.

Okaze de la datreveno de lia budhaniĝo, la 14an de oktobro, multaj dalitoj vizitas la iniciĝan kampon en Nagpur. Li forpasis la 6an de decembro; tiun tagon oni solenas en la *Ĉajtja-bhumi* (sankteja loko) en Mumbajo, kie

li estis kremaciita. Fine, la 25an de decembro la dalitoj festas ne la kristnaskon, sed la tagon de la virina liberiĝo, rememore al libro-bruligo okazinta tiun tagon en 1927 pro iniciato de d-ro Ambedkar. Temis pri ekzemplero de *Manusmriti*, sanskritlingva preceptaro establinta en la hinduismo la sisteman diskriminacion kontraŭ virinoj kaj dalitoj (tiun preceptaron verkis la religi-kodiganto Manu iam inter la 2a jarcento antaŭ la Komuna Erao kaj la 3a jarcento de la Komuna Erao). Li proponis, ke la bruligon de tiu libro la virinoj rigardu kiel simbolan pri interkonsento inter la virinoj kaj la dalitoj en la moderna Barato kune strebi por socia ordo, kiu forigos la diskriminacion de la ortodoksa hinduismo kontraŭ tiuj kategorioj. Tial Ambedkar signis la 25an de decembro kiel tagon de virina liberiĝo.

La intenco reatribui la 1-an de januaro kaj la 25an de decembro al simbolaj signifoj indikas la deziron de d-ro Ambedkar, kaj de la celebrantoj hodiaŭ kiuj dividas liajn prioritatojn rilate al la festado, movi la publikan atenton for de la ikonaj tagoj de la kristana kalendaro kaj establi novajn gravecojn. Post la memmortigo la 17an de januaro 2016 de la hajderabada studento Rohith Vemula – gvidanto de dalita studenta movado – la dalita movado, precipe ĝia ambedkarisma tendenco, kiun emfazis Vemula, akiris novan elanon en la tuta Barato. La festotagojn menciitajn ĉi tie nun celebras ne nur la dalitaj maharaŝtranoj, sed ankaŭ aliguberniaj dalitoj, kaj novaj aliancanoj de la movado ekster la vicoj de la dalitoj mem.

**Probal Dasgupta (Barato / Hinda Unio)**

Ĉu vi pagis vian kotizon?

Bonvolu subteni **ATEO-n!**

Antaŭdankon!

# Reagoj al la ideo de “maldiservo”

Reage al la diversaj artikoloj pri la “maldiservo” (*Ateismo*, Nov. 2019), mi ne vidas la utilecon, nek la oportunecon kopii la religiajn ritojn kaj adapti ilin por ateistoj. Ĉu ni vere bezonas kuniĝi ĉiujn dimanĉojn por persvadi nin, ke ni pensas ĝuste, same kiel dikredantoj? Alidirite, konsistigi unu plian komunumon? Ŝajnas ke ni “simiigus” religianojn. Krome mi havas ion alian por fari dimanĉe… Fakte, Song Jeong-ok (Koreujo) bone resumas mian penson: ni ne perdu tempon pri tiuj fuŝaĵoj!

Alia rimarko, kiu rilatas al alia artikolo en tiu numero: mi multe aprezis la artikolon pri la Jehovanoj persekutataj en Rusujo.

**Martine Rivière (Francio)**

En la lasta numero de *Ateismo*, mi denove trovis tiun strangan kaj malfacile kompreneblan vorton: *maldiservo*. Mi memoras ke, okaze de la kongreso en Lisbono, jam provis kaprici tiu ĉi tedaĵo. Ĉar la radiko “mal” estas vera prefikso, ĝi rilatas al la vorto-fino, do al la ĉefelemento de kunmetaĵo. La signifo estas “malservo de Dio”, pri kiu mi tiam plu restis perpleksa. Post legado de kelkaj paĝoj, mi nun komprenas, ke la vorto evidente ne taŭgas, ĉar videble temas pri speco de rito por nekredantoj (eble la intenco de la vortiginto estis “servo por maldio” aŭ io tia). Feliĉe ke mi ne estis kongresano en 2019! Mi certe samopinius kiel Song Jeong-ok (el Koreujo).

**Christian Rivière (Francio)**

# Budhismaj temploj en la japana sekulara vivo

La plejparto da japanoj estas senreligiuloj. Ekzistas, tamen, dekoj da miloj da budhismaj kaj ŝintoismaj temploj tutlande en Japanio. Budhismo originas en antikva Barato, dum Ŝintoismo estas japana propra religio.



Budhisma templo Eiŝo-ĝi en Tokio
(Foto de: Hakatamon/ TripAdvisor)

Ĉi tie mi fokusiĝas pri budhismaj temploj, kiuj nombras ne malpli ol 77 000 kun pluraj sektoj. En la centra parto de Tokio videblas multaj tiuj temploj, akompanataj de tombejoj. Sed ili apenaŭ faras religian agadon. Tiu ĉi sistemo estas nomata "danka'" (templokomunumo), kiu datiĝas de la Edo-epoko (1603-1868). Tiutempe la japanoj devis deklari pri naskoj, mortoj, transloĝiĝoj ktp en temploj en sia regiono. Budhismaj temploj estis kvazaŭ publikaj oficejoj. En la Mejĝi-epoko (1868–1912) komenciĝis moderna sistemo, kiam civitanoj deklaris naskojn ktp. en publikaj oficejoj. Sed restis tombejoj ene de budhismaj temploj. Japanoj tenas proprajn tombojn en propraj temploj, kiuj ricevas kotizojn por administri la tombojn de tiuj familioj.

Esence kaj principe estus racie kaj oportune konstrui komunajn tombejojn senrilate al sektoj en aliaj lokoj ol budhismaj temploj. Sed neniuj politikistoj nek ĵurnalistoj mencias tiun ĉi temon.

**Igaraŝi Takeo (Japanio)**

# Ĉu mi devos translokiĝi?

*Tiu ĉi teksto estis verkita responde al la artikolo "Adiaŭi karulon: persona sperto de laika funebrado" de Suzanne Roy (Kanado) en* Ateismo*, novembro 2019.*

Iam mi pensis pri mia morto. Mi revis, ke mian korpon oni cindrigu kaj poste mi volus, ke ili la cindrojn disĵetu en iun riveron aŭ en iun parkon. Mi vidis en iu tombejo en Ĉeĥio, ke estas eĉ loko, kie oni povas disĵeti homajn cindrojn.




Kiam mi pri tio komencis paroli en mia lando, Pollando, mi estis mirigita. Oni povas la korpon cindrigi sed posta disĵetado de la cindroj estas ne ebla. Oni devas la cindrojn enŝovi en iun tombon. Se iu parenco havanta la cindrojn tion ne farus, li/ŝi estus punita.

Mi ne volas postlasi tombon, ĉar pro la kutimo en mia lando, miaj parencoj devos ĉiujare purigi la tombon kaj ekflamigi kandelon sur ĝi. Kaŭze de la moroj, ĉirkaŭ la 1-a de novembro ĉiujare multaj vojaĝantoj mortas pro akcidentoj survoje. Mi amas miajn parencojn kaj mi ne volas, ke ili havu riskon morti pro mia antaŭa morto. Bedŭrinde Pollando ne estas Kanado. Do, kion fari?

**Sileziano (Pollando)**

## Ateismaj perloj de antikva Grekio

**El la libro *Kiel la homo ekis pensi* de Nikolao Gudskov, Impeto**


A ) **Prodiko** el Keos (465 – 395 a.K.E.)

“Prodiko... laŭ la atesto de Seksto Empiriko, opiniis, ke la imago pri la dioj devenas de la homa praktiko, unuavice agrikultura: *la Sunon, Lunon, riverojn, fontojn kaj ĝenerale ĉion utilan la antikvaj homoj nomis dioj pro la utilo, de ili ricevata, kiel ekzemple la egiptanoj – Nilon... Kaj tial la pano estis nomita Demetra, vino – Dionizo, akvo – Pozidono, fajro – Efesto kaj same ĉio, kio utilas.*” (paĝ. 119-120).

B) **Kritio** el Ateno (460 – 403 a.K.E.)

La sofisto “Kritio ... en sia tragedio Sizifo ... vortumas tute novan kaj originalan teorion pri deveno de religio, kiun konservis por ni Seksto Empiriko:

*Kiam la viv´ de Homoj estis simpla / Besteca kaj regata nur de forto, / Kiam bonul´ ne havis rekompencon / Nek malbonulo spertis ian venĝon, / Tiam la homoj por justeco leĝon faris / Por puni perturbantojn de la ordo, / Por ke krimulon eblus ekzekuti. / Sed kiam leĝ´ perforton malpermesis / Malkaŝe fari, ĝi ekfloris kaŝe. / Do, iu vir´ sagaca kaj saĝega / Inventis diojn, por ke homojn bridi: / La maliculoj pro la tim´ ne povu / Malbonon fari, diri, pensi, sonĝi. / Jen kiel li konceptis pri la dio: / Ekzistas ie iu eternulo, / Kapabla ĉion vidi, aŭdi, pensi, / Zorgema, kun natura supereca. / De la mortuloj li perceptas agojn, / Kaj ankaŭ pensojn eĉ ne eldiritajn, / Do kaŝi la malbonon estus vane. / Instruon tiun la saĝul´ proklamis, / Kaj estis ĝi mensoga, sed utila. / La homojn li mirigis jen pro kio: / Li metis la loĝlokon dian tien, / De kie venas la plej gravaj timoj / Kaj same ĝuoj plej agrablaj venas - / Al la ĉiela sfer´, naskanta fulmojn / Kaj tondron bruan, elvokantan tremon, / Kaj stela bril´ la vivon ornamegas, / Kaj pluvo varma, fonto rikolto... / Do, timojn per fabelo ordiginte, / Li dion tion firme jam establis; / Per sia saĝa, ruza inventaĵo / Estingis li eksplodojn de perforto.* *** Mi pensas, tiel iu en




*komenco / La homojn kredi diojn ja konvinkis."* (paĝ. 120-121).

C) **Diagoro** el Meloso, lernintoj de Demokrito (+/- 465 – 410 a.K.E.)

"Li navigis ien, kaj komenciĝis ŝtormo. Aliaj pasaĝeroj de la ŝipo volis lin mortigi, opiniante, ke dioj ilin punas pro tio, ke ili kunprenis ateiston. Sed la filozofo diris: «Rigardu aliajn ŝipojn! Ĉu vi opinias, ke ankaŭ sur ĉiu el la ŝipoj, suferantaj la ŝtormon, troviĝas po Diagoro?»

Kaj ankoraŭ unu simila anekdoto pri li. Li foje venis al Samotrakio, kaj tie iu lia amiko lin demandis: «Jen vi opinias, ke dioj ne zorgas pri homoj. Sed ĉu vi ne vidis en la templo multegajn tabuletojn kun dankesprimo de homoj, kiuj evitis pro peto al dioj pereon dum marvojaĝoj?» «Certe, jes, - respondis Diagoro, - sed mi ja ne vidis tabuletojn de tiuj, kies ŝipojn ŝtorno dronigis.»" (paĝ. 122).

D) **Demokrito** el Abdero (460 – 370 a.K.E.)

"De la objektoj, konsistantaj el atomoj, eliĝas supraj fajnegaj atomaj tavoloj – imagoj aŭ *idoloj.*

Ili trafas niajn sensilojn kaj vekas perceptojn. Dumvoje la idoloj povas distordiĝi kaj trompi niajn sensojn. Ekzemple, perceptante distorditajn idolojn de realaj aĵoj la homo venas al konkludo pri ekzisto de neekzistantaj objektoj – ekzemple, dioj. Jen estas tre pure ateisma klarigo pri la deveno de imagoj pri dioj!” (paĝ. 135).

E) Kirena skolo: **Teodoro** el Kireno (465 – 398 a.K.E.) kaj **Eŭĥemero** el Meseno (330 a. K. – 250 a.K.E.)

“Teodoro… plene neis ekziston de la dioj, kaj jam de samtempuloj ricevis la kromnomon *ateisto*. Feliĉe Kireno estis pli tolerema civito ol Ateno, kaj Teodoro ne spertis pro siaj opinioj persekutojn.

Al la kirena skolo apartenis ankaŭ alia fama kaj estimata jam tiam ateisto – Eŭĥemero, vivinta fine de la 4a jarcento a.K.E. ĉe la kortumo de macedona reĝo Kasandro. Li ne nur neis ekziston de la dioj, sed elpensis propran teorion pri la deveno de la religiaj kultoj. En sia verko *Sakra listo*, de kiu ni konas nur rerakontojn kaj fragmentojn, li asertas, ke la dioj de Helenio estis origine reĝoj, herooj, militistoj aŭ bonfarantoj de la popolo, post sia morto diigitaj. Ekzemple Zeŭso estis antikva reĝo de Kreto, kaj lian tombon oni eĉ montradis en Knoso al scivolemuloj…”. (paĝ. 209-210)


*Elĉerpaĵoj el la supremenciita libro de N. Gudskov elektitaj por* Ateismo *de Luís Ladeira (Portugalio)*

## Notoj pri ateologia verko

Antaŭ la nuntempa endomigo mi aĉetis la libron *Traktaĵo pri ateologio* de Michel Onfray, fama altranga filozofo, tradukitan en Esperanton de Paul Signoret.

Ĉar mi foliumis la multenombrajn paĝojn de la libro, konsultinte la enhavon, mi intencis limigi mian studeman legadon al la unua parto, celante scii, kiuj estis la antaŭuloj de ateismo.

En la ĉapitro "La odiseado de la nekredantoj" troviĝas multaj demandoj (Ĉu Dio mortis? Kiu vidis la kadavron? ktp) sed bedaŭrinde malmultaj respondoj... La verkisto klopodas tre klare difini la vorton *ateisto*, ĉar multaj aŭtoroj aŭ pensuloj ŝajn-ateistaj tute ne asertis la neekziston de Dio.



(Fonto: satesperanto.org)

En la ĉapitro "Ateismo kaj eliro el nihilismo", la aŭtoro skribas, ke Erasmo, Montanjo kaj aliaj havas la famon de nekredantoj, de ateistoj. Por ili, tamen, la termino ne taŭgas. Serĉante la unuan ateiston, eble ni trovas la portugalan Kristoforo Ferreira, kiu forĵuris sian kredon en 1614, ĉar por li la religio estas nur homa inventaĵo! Tamen nenie li asertas, ke Dio ne ekzistas...

Post nelonga tempo, mirakle aperis alia pastro, abato Meslier (1664-1729), kiu en dika verko kovris per koto la Eklezion, la Religion, Dion ktp. Unuafoje en la historio de la ideoj, iu filozofo dediĉas verkon al la temo ateismo! Tiu libro aperis post la morto de la pastro Meslier, kiun oni povas konsideri la unua ateisto (kiel ekzempla oksimoro): ateisma pastro!

Mia serĉo de la komenca periodo de ateismo estis solvita dank' al la pasiiga verko de Michel Onfray, kaj mi esperas daŭrigi la legadon de la aliaj ĉapitroj... hejme aŭ ne!!

**Josiane Ferrand (Francio)**

# Eksislamanino pri la minaco de islama faŝismo

**_Detrui la Islaman Faŝismon_ (_Détruire le Fascisme Islamique_ de Zineb El Rhazoui, Francio 2016)**

Dediĉita "al islamanoj-ateistoj", ĉi tiu libro komenciĝas per citaĵo de Jean-Paul Sartre pri rasismo ekstere kaj ene de ni. Tia komenco kreas iujn demand-ojn. Kian antaŭjuĝon pri Islamo la neislamanoj devas en si mem kontraŭbatali enkadre de kontraŭrasisma ago? Aŭ kiun islamismon valoras distingi disde islama radikalismo, por eviti inter-miksi bonan kaj malbonan islamon? La aŭtoro ne havas dubojn: neniun!

La perforto kontraŭ la "mal-fideluloj", la subpremado de la virinoj, la deziro subjugigi ĉiujn popolojn kaj submeti ilin al sia religia matrico: jen la esenco de islamismo! Tio estas skribita en la sanktaj tekstoj. Ĝi troviĝas en la Korano kaj en la biografioj de la "profeto", kiuj gvidas la vivon de la kredantoj. De ili neniam la islamaj teologoj deflankiĝis. Kaj tiuj, kiuj tion faris – precipe laikaj kleruloj – ne estis apogitaj de la klerika klaso kaj estis persekutataj (per "fatvoj" kiuj jam mortigis plurajn klerulojn identigitajn de la aŭtoro en la verko).

Pri tio, Zineb, kiu prezentas sin kiel islamaninon – ŝi laboris ĉe la satira ĵurnalo *Charlie Hebdo* kaj nur hazarde eskapis la teroristan atakon okazigitan en la jaro 2015 – ne cedis: islamo bona ne estas! Islamo estas perforta, malcedema kaj netolerema lernejo, kiu sin kamuflas, laŭ la cirkonstancoj, por plej bone atingi siajn celojn de superregado. Tiam ŝi denuncas la "utilajn idiotojn", kiuj, en Francio, per argumentoj favoraj al individua libereco, al proleta rezisto ("islamano, la nova proleto!"), kontraŭ la imperiismo kaj favoraj al libera praktikado de religio, kunlaboras kun ĉi enpenetra taktiko – iujn feministojn, iujn politikajn maldekstrulojn, iujn dekstrajn kaj maldekstrajn taktikistojn, kaj la tiel nomatajn moderajn imamojn.

Enviciĝante en la koruso de libereco kaj rajto al mal-sameco,

la fikunlaborantoj ne konscias, ke tiuj en la koruso, kiuj kriegas kontraŭ la islamofobio, intermiksas en tiu koncepto la rajton al religia libereco kaj la plej tradiciajn praktikojn, kiuj rekte kontraŭas la homajn rajtojn. Cetere ĉi tiu miksaĵo de konceptoj jam rezultas de tia memtrompa kunlaboro. Laŭ la aŭtoro ne eblus alveni al difino de islamofobio, en la vortaro *Larousse* "kontraŭemo al islamo, al islamanoj" – en kiu identiĝas islamo kaj islamanoj – sen la erarpensa kunlaboro de iuj maldekstraj partioj, feministoj kaj aliaj.

Tiel faŝisma doktrino – netolerema, perforta kaj subjugiganta – estas prezentata kiel kulturo kaj identigo, kaj arogas al si la rajton al tiu malsameco kiel demokratia ekzerco. Tamen la sola demokrata kaj memkonforma sintenado, laŭ Zineb el Rhazoui, estas kontraŭi la islamon, ĉar tio signifas kontraŭbatali faŝismon. Cetere lasi tiun batalon enmane de politikaj ekstremdekstruloj, same kiel cedi al la ĉantaĝo pri islamofobio, signifas endanĝerigi la demokration!

**Luís Ladeira (Portugalio)**

## Socia distancado en Barato

La esprimo "socia distancado" iĝis grava dum la kronvirusa epoko. Kiel informas nin la Vikipedio, "La celo de la socia distancado estas malpliigi la oftecon de kontakto inter infektitaj kaj neinfektitaj homoj". Nu, la meza loĝdenso de Barato estas 410 loĝantoj/km²; en urbego kiel Mumbajo, tiu cifero preskaŭ *centobliĝas* ĝis 32 000 loĝ./km²; kaj en ekstrema kazo, kiel en la kvartalo Dharavi en Mumbajo, la loĝdenso estas dekoble *pli* - ĝis kapskuiga 360 000 loĝ./km²! Klare, sub tiaj ĉi kondiĉoj, "socia distancado" funkcius alimaniere ol en malpli loĝdensaj lokoj.

Sed ne pri la funkciado de tiu praktiko ni parolos. Efektive, laŭ multaj observantoj, la esprimo "socia distancado" mem estas evitinda en Barato pro tute alia kialo, nome, la kastsistemo. Tabuoj pri fizika kaj socia kontaktoj inter kastoj estis parto de la kastsistemo en suda Azio. Tiu praktiko de "netuŝebleco"

diskriminaciis aparte kontraŭ la dalitoj, la kutima nuntempa nomo por la iamaj "netuŝebluloj" en la regiono. Kontraŭ la kutimo baraktis multaj sociaj reformistoj dum la 19a kaj 20a jarcentoj – inter aliaj, Ambedkar kaj Gandhi. "Netuŝebleco" estas kontraŭleĝa en Barato, Nepalo kaj Pakistano.

Kvankam la praktiko estas malpli ofta kompare al, ni diru, jarcento antaŭe, pluraj komentariistoj barataj diras, ke uzi la esprimon "socia distancado" revivigas ĝuste tiujn antaŭjuĝojn kontraŭ aliaj homgrupoj. La granda plimulto el tiuj kiuj suferis pro la kontraŭvirusa moviĝlimigo estas ĝuste la dalitoj kaj aliaj regionaj kaj religiaj malplimultoj. Aparte menciindas ĉi-kuntekste la longdaŭra malamikemo de la nuna dekstrema, hindunaciisma koalicio al la Islamo (vidu "Ondo de netoleremo en Barato" en *Ateismo* 22, 2016). Ĝuste ĉar islamanoj en Barato estas plejparte malriĉaj, ili suferas multe pro la nuna moviĝlimigo.

Fakuloj kaj aktivuloj taksas, ke la nombro de migrantaj laboristoj en la lando estas minimume 140 milionoj (kaj eble eĉ 230 milionoj). Je la 24a de marto, la barata ĉefministro anoncis je la 8a vespere, ke la moviĝ-limigo komenciĝos ekde la noktomezo – t. e. kun 4-hora averto. Tio estis grandega ekonomia bato por tiuj malriĉuloj. Ili nek plu havis laboron, nek estis permesataj reveni al siaj propraj vilaĝoj kaj urbetoj. Oni kritikas la nunan registaron multe pro tiu ĉi kontraŭ-malriĉulara paŝo. Tiufone, la esprimo "socia distancado" do aldonas pluan simbolan insulton al ilia jame kriza situacio.

Alternativaj esprim-proponoj inkluzivas la jenajn: fizika / sekura / necesa / sana / kontraŭvirusa distancado. En diversaj lingvoj de la lando, ĵurnalistoj jam forĵetis "socian distancadon". Ekzemple, granda hindia televidkanalo ekuzas la esprimon, "korpa distancado". Tiel en ĉi tiu malfacila tempo oni provas fari la lingvaĵon iom pli sentema kaj homeca. Kiel rimarkis ĉi-kuntekste la lingvisto Ganesh Devy [ganeŝ devi], "La lingvo estas la bazo de percepto kaj kogno. Tial la esprimoj, kiujn ni uzas en nia socia interparolado, influas niajn rilatojn kun la faktoj kaj eventoj en la vivo".

**A. Giridhar Rao (Barato / Hinda Unio)**

# "Pasiva helpo" al sinmortigo aprobita en Germanio

La Federacia Konstitucia Kortumo, la plej alta jura instanco de Germanio, la 26an de februaro 2020 agnoskis homan rajton de sinmortigo. Kaj ĝi deklaris paragrafon kontraŭkonstitucia, kiu ĝis nun krimigis tiun, kiu pasive, sed regule helpas al sinmortigonto.

Pasive helpi al morto signifas, ke la helpanto donas al iu deziranta la morton nur la eblecon, por ke tiu mem kaŭzu sian propran morton, ekzemple per enmanigo de veneno al la mortonto.

En Germanio sinmortigo ne estas krimo.

Sed per la paragrafo 217 de la germana kriminala kodo ĝis nun povus esti punata persono, kiu – ne profitcele, tamen regule – helpis al aliuloj mortigi sin. Ekzemple kuracisto, kiu provizis per mortiga medikamento homon ne plu kuraceblan, mortmalsanan kaj suferegantan, laŭ tiu ĉi paragrafo estis krimulo. (Unuopa helpo do ne estis punata).

En 2015 per tiu ĉi preskribo la germana registaro intencis malhelpi al kuracistoj kaj al tiel nomataj "morti-kluboj" iun intertraktadon pri la morto. Sekve precipe morte malsanaj personoj ekde tiam vojaĝis al Svislando aŭ al Nederlando, por serĉi la tie jam laŭleĝan profesian helpon al suicido.

Kontraŭ la koncerna paragrafo 217 plendis malsanuloj, kuracistoj kaj la menciitaj kluboj pro lezo de iliaj homaj rajtoj. Kaj la kortumo akceptis ilian argumentadon.

La kortumo verdiktis, ke la homa digno inkluzivas ankaŭ la rajton mem decidi pri la propraj vivo kaj morto. El tio, laŭ ĝi, cetere sekvas, ke ne nur morte malsana persono, sed ĉiu ajn homo, juna, maljuna, sana aŭ malsana povas decidi pri la propraj vivo kaj morto. Kaj krome, ke la homa rajto inkluzivas ankaŭ la rajton peti profesian helpon de aliulo, ekzemple per aĉeto de venena medikamento.

La verdikto en la germana socio kompreneble trafis ne unuaniman aplaŭdon. Precipe voĉoj el la eklezioj katolika kaj protestanta bedaŭris kaj kritikis ĝin. Ili ja instruas, ke la homo ne rajtas forĵeti sian de Dio donitan

vivon. Krome ili timas, ke interesatoj estonte povus urĝi grave malsanajn personojn, ke ili metu finon al la propra vivo.

Cetere estas kaj restas puninda tiu, kiu aktive agante kaŭzas la morton de persono, ekzemple kuracisto, kiu donas mortigan infuzaĵon, eĉ se antaŭe li estis urĝe petita de la malsanulo.

Mi bonvenigas la verdikton. Mi respektas homon, kiu iras laŭ tiu vojo, konsiderante ĝin la ĝusta por si mem. Mi same respektas tiun, kiu malakceptas sinmortigon kiel eliron el malsano aŭ iu ajn persona krizo.

Neniu ja estas devigata mortigi sin mem kaj ankaŭ neniu persono estas devigata helpi al mortemulo. Ĉiu agu laŭ sia konscienco.

**Horst Vogt (Germanio)**

# Kiel religioj disvastigis la kronviruson

Religioj ne nur estas senutilaj en la tutmonda batalo kontraŭ la kronvirusa pandemio, ili ankaŭ mem helpis disvastigi la viruson inter siaj anoj kaj al la socioj en kiuj ili troviĝas. Ni rigardu ekzemplojn el landoj en kvar kontinentoj: Suda Koreio, Irano, Israelo, Brazilo, Hindio kaj najbaraj landoj, Usono, Francio kaj Rusio. Kaj el la tri abrahamidaj religioj: kristanismo, islamo kaj judismo. En preskaŭ ĉiuj kazoj, temas pri religiestroj, kiuj malgravigis la epidemion, spite traktis registarajn rekomendojn, avertojn aŭ ordonojn, kaj asertis ke Dio kaj fido protektos kredantojn – la rezulto estis endanĝerigado de la religianoj kaj iliaj komunumoj kaj socioj, ofte kun mortigaj efikoj.

**Suda Koreio** estas konata pro siaj fervoraj kristanaj grupoj. En frua marto 2020 oni raportis, ke preskaŭ du trionoj de ĉiuj kazoj (ĉirkaŭ 7000 tiam) de Kovid-19 en tiu lando estis ligitaj kun nur unu kristana eklezio, la kulteca Ŝinĉonĝi (Shincheonji), kiu organizas grandajn kuniĝojn de siaj anoj. Tion ĝi daŭre faris jam post la alveno de la viruso tiulande. Dum la amasrenkontiĝoj ĉe “mega-preĝejo” en la urbo Daegu, miloj estis sardele proksimaj kaj laŭte preĝis, kantis, ekkriis dum 2-3 horoj. Bonegaj kondiĉoj por la viruso. Krome, la eklezio malpermesis la uzon de



Anoj de Ŝinĉonĝi amase kaj dense ariĝas.

maskoj kaj instigis siajn anojn ne timi Kovidon kaj koncentriĝi je konvertado. La estroj de Ŝinĉonĝi malhelpis al ŝtatuloj spuri la kontaktojn de infektitaj eklezianoj, kaŝis membrar-informojn. Estis vasta reago kontraŭ la eklezio: peticio por kontraŭleĝigi ĝin akiris 1,25 milionojn da subskriboj, la urbestro de Seulo eĉ postulis murd-akuzon kontraŭ ĝia fondinto Lee Man-hee. Malpli grandskale, ankaŭ kelkaj aliaj koreaj preĝejoj fariĝis bredejoj de la viruso. Inter ili, notindas la Rivero de Graco, kie oni metis ŝprucigilon kun sal-akvo en la buŝojn de sinsekvaj preĝantoj, kredante, ke tio kontraŭagos la viruson! Fakte ĝi infektis ilin amase. Multaj koreaj preĝejoj malatentis registarajn ordonojn pri grandaj amasiĝoj kaj distancigado. Al koreaj kristanoj irado al preĝejoj estas tre grava, kaj krome la ekleziestroj forte premas anojn pri ĉeestado – kun malbona rezulto dum la epidemio.

Ĉe la alia flanko de Azio kuŝas **Irano**, unu el la landoj plej trafitaj de la viruso. En la frua fazo de la epidemio ĝi havis la duan rangon mondskale post Ĉinio, sekve la trian post Ĉinio kaj Italio. La epidemio en Irano komenciĝis en la sankta urbo Ĥomo (Qom), de kie pilgrimoj disvastigis la viruson trans Irano kaj al najbaraj landoj. Eĉ post kiam estis klare, ke epidemio ekas disvastiĝi en lia lando, Mohamedo Saidi, estro de la fama sanktejo Fatima Masumeh en

Ĥomo, kuraĝigis pilgrimojn veni, dirante, ke “Ni konsideras tiun ĉi sanktejon loko de kuraciĝo”. Altrangaj klerikoj forte kontraŭstaris proponon enkvarantenigi Ĥomon Vuhan-stile. Komence, iranaj oficialuloj neis la seriozecon de la viruso, sed multaj el ili, inkluzive la vicministron pri sano mem, infektiĝis. Por klerikoj estis nekredeble, ke epidemio povus ekflamiĝi en sankta urbo, kaj ili deklaris tion mensogo elpensita de la malamikoj de Irano. La ĉefo de la Civitana Defend-Organizaĵo parolis pri la dio-donita imuneco de la urbo. Tamen, fine en malfrua marto, multaj sanktejoj, inkluzive tiujn en Ĥomo, estis fermitaj de la registaro – kaj nur du monatojn poste estis remalfermitaj. Sed, pro la neagado en la unua fazo de la epidemio, finmaje la nombro da kazoj atingis 135 000 kaj la nombro da mortoj 7400.

Tute malatentante politikon, post granda disvastiĝo en Irano, la kronviruso ankaŭ frapis ties malamikon **Israelo**. La israela registaro popaŝe enkondukis limigojn, antaŭ ol deklari nacian krizo-staton la 19an de marto, kaj en la sekvaj tagoj pli striktigis la limigojn. Sed la limigoj estis malbone ricevitaj en distriktoj loĝataj de la ĥaredoj, ultra-ortodoksaj judoj, kaj okazis stratbataloj kun la polico – ili nomis la limigojn “milito kontraŭ Dio”. Influa rabeno Ĥaim Kanievski el la ĥareda urbo Bnei Brak forte kritikis la fermon de sinagogoj kaj jeŝivoj, kaj la malpermeson de ariĝoj por preĝado, geedziĝoj ktp, dirante ke tio estas pli danĝera ol la viruso, kaj ke la Torao protektos la ĥaredojn. Spitante la limigojn, ĥaredoj daŭre ariĝis en siaj densaj kvartaloj – ĉirkaŭ 400 ĉeestis funebron de rabeno en Bnei Brak. Ĝi fariĝis la ĉefa kovida bredejo en Israelo, kaj la ĥareda kvartalo de Jerusalemo, Mea Ŝearim, la ĉefa tie. Okazis grandaj unutagaj saltoj en la kaz-nombroj en Bnei Brak, kaj ĝis frua aprilo, triono de la infektiĝoj en Israelo troviĝis tie kaj en Jerusalemo, kaj tri kvaronoj de la jerusalemaj en Mea Ŝearim. En Bnei Brak malfru-maje estis ĉirkaŭ 3000 kazoj kaj en Jerusalemo 3700 el 16 700 tutlande. Kvankam la ĥaredoj konsistigas nur 10% de la loĝantaro, ili konsistigis 50% de la kovid-enhospitaligitoj. Kiel koreoj koleris kontraŭ la Ŝinĉonĝianoj, sekularaj israelanoj koleris kontraŭ la ĥaredoj, kiuj fine fariĝis pli obeemaj al la kontraŭkovida regularo.



Policanoj alfrontas ĥaredojn en Jerusalemo.
(Foto de: Ahmad Gharabli / AFP)

La viruso, kiu unue tuŝis la eŭrazian superkontinenton, saltis trans oceanojn kaj atingis ankaŭ Amerikon. Kiel Usono kaj Suda Koreio, **Brazilo** estas konata kiel lando de fervoraj protestantoj. Kvankam la lando estas tradicie katolika, nun la protestantoj konsistigas 22% de la loĝantaro, inkluzive la prezidanton Jair Bolsonaro, aparte fanatika kristano. Ekde la komenco li malserioze traktas Kovidon kaj kontraŭstaras ĉiujn izoligajn regulojn. Li eĉ anoncis nacian tagon de preĝado por forigi la viruson. Malgraŭ la alvokoj de san-instancoj, multaj brazilaj mega-preĝejoj, kiuj ampleksas ĝis 15 000 preĝantoj, restis malfermitaj, okazigis gigantajn mesojn. Silas Malafaia, estro de granda evangelia eklezio kaj proksimulo de Bolsonaro, instigis pastrojn malatenti la san-ministerian rekomendon fermi preĝejojn. En la ŝtato Sao-Paŭlo mega-preĝejo organizis meson kun 10 000 homoj du tagojn post la eldono de dekreto kontraŭ ariĝoj de pli ol 500 homoj. La multmilionula estro de la Universala Eklezio de la Dia Regno (kia nomo!), al kiu ĝi apartenas, deklaris, ke la viruso estas komploto de Satano kaj la

antidoto estas fido. Ankaŭ aliaj eklezioj asertis, ke kredantoj estas protektataj de Dio kaj ne infektiĝos. Certe ĉio ĉi kontribuis al la rapida disvastiĝo de la viruso en Brazilo, kiu en majo atingis la duan lokon monde kaj transiris en junio la nivelon de 700 000 kazoj kaj 30 000 mortoj. Menciindas, ke du trionoj da brazilanoj malaprobas la traktadon de la virus-krizo fare de Bolsonaro.

Religio ankaŭ kontribuis al la kresko de la epidemio en Suda Azio. Preskaŭ triono de la kazoj en **Hindio** en aprilo estis ligitaj kun kunveno de la islama misiista movado Tabligi Ĝamat' (Tablighi Jamaat), laŭ la san-ministerio. Ĝi arigis kelkmil predikantojn en Delhio mezmarte, inkluzive pli ol 1000 eksterlandanojn. Oni nomis ĝin "superdisvastiga evento" (*super-spreader event* angle). Dum nacia fermiĝo ne estis deklarita ĝis la 24a de marto, jam la 13an, la delhia registaro malpermesis konferencojn kaj seminariojn. Malgraŭ tiu malpermeso, kaj malgraŭ la jam observata kreskanta pandemio, Tabligi ne nuligis la kunvenon. Post la evento, la instancoj tutlande spuris la disirintajn partoprenantojn kaj iliajn kontaktojn kaj metis en kvarantenon 25 000 homojn. Tamen, jam la viruso multe disvastiĝis pro la kunveno. Ankaŭ notindas, ke multaj el la eksterlandanoj (sed ankaŭ iuj el la hindoj) ĉeestis Tabligi-kunvenon kun 16 000 partoprenantoj en Malajzio nelonge antaŭe – ĝi fariĝis la ĉefa kronvirusa disvastigilo en sudorienta Azio. Bedaŭrinde multaj hinduoj kulpigis islamanojn ĝenerale, kvankam temis pri unu specifa grupo kaj ankaŭ kulpis la nacia registaro pro ĝiaj malfruaj paŝoj rilate al fermado de la lando. Fakte, en la tagoj post la delhia kunveno, dekoj da miloj da hinduoj vizitis templojn. Kaj ĵus antaŭ la delhia ariĝo, okazis granda sikha festivalo kie predikanto reveninta de Italio disvastigis la viruson – sekve, la instancoj kvarantenis milojn en Panĝabo. La kaznombro en Hindio kreskis de 120 mez-marte ĝis 200 000 fru-junie.

En najbara **Pakistano**, eĉ pli granda kunveno de Tabligi Ĝamat' apud Lahoro, ariganta ĉirkaŭ 70 000 homojn, respondecis pri 60% de la kazoj tutlande en mez-aprilo. Ĝi okazis tuj antaŭ la delhia kunveno. La organizantoj ignoris registaran peton nuligi la eventon. En aprilo, la nacia registaro deklaris tutlandan fermiĝon, kiu in-

kluzivis malpermeson kontraŭ amasa preĝado en moskeoj. Tamen multaj klerikoj alvokis al preĝantoj ne atenti la ordonon. Baldaŭ la registaro cedis al la postulo de influaj klerikoj escepti moskeojn el la nacia fermiĝo dum Ramadano. La Pakistana Medicina Asocio kondamnis la decidon. La religiaj ariĝoj en Pakistano multe kontribuis al la kresko de Kovid-kazoj de 20 mez-marte ĝis 70 000 fin-maje. En alia najbara ŝtato, **Bangladeŝo**, malgraŭ la alvokoj de la instancoj, 10 000 homoj ariĝis en urba kampo mez-marte por preĝe liberigi la landon de la viruso! Kelkajn tagojn poste nacia fermiĝo estis ordonita, sed spite de tio, en aprilo okazis funebro de konata kleriko, gvidanto de islamisma partio, al kiu venis 100 000 homoj. Ekde la tago de la amaspreĝado ĝis la fino de majo, la kaz-nombro kreskis de 14 ĝis preskaŭ 50 000.

Ni revenu nun al Ameriko, kaj rigardu la landon, kiu ekde malfrua marto havas la plej multajn kazojn en la mondo. Kvankam religio ne estis granda Kovid-disvastigilo en **Usono** kaj preĝejoj plejparte observis la limigojn ordonitajn aŭ rekomenditajn, diversaj evangeliaj eklezioj rezistis. En Luiziano, unu el la ŝtatoj plej forte frapitaj, Tony Spell, la estro de Life Tabernacle ripete organizis diservojn kun pli ol 1000 homoj, kaj estis arestita pro malobeado al ordono kontraŭ ariĝoj de pli ol 50. Spell insistis, ke “Dio ŝirmos nin de malbono kaj malsano”. En Florido, la estro de la Rivero-Eklezio ankaŭ estis arestita pro okazigado de diservoj kelkcent-homaj malobee al ordono resti hejme – laŭ li, ariĝi preĝ-cele estas konstitucia rajto nelimigebla eĉ dum epidemio. En Ohio, la eklezio Solid Rock spitis alvokojn de la ŝtatestro kaj daŭre kunvenigis centojn da homoj – fakte en kelkaj ŝtatoj, la ferm-ordonoj ne ampleksis preĝejojn, do la instancoj povis nur alvoki. Ekleziestro en Virginio, kiu spitis alvokojn kontraŭ grandamasaj diservoj, dirante ke “Dio estas pli granda ol la viruso”, mem mortis pro Kovido. Multaj civitanoj koleriĝis kontraŭ la preĝejoj, kiuj okazigis amaskuniĝojn malgraŭ la viruso. Religio ankaŭ ludis rolon en la kontraŭfermadaj protestoj, kie oni vidis la absurdan sloganon “Jesuo estas mia vakcino”. Krome menciindas la ĥasid-judoj de la Nov-Jorka regiono. Kiel iliaj ĥaredaj gekuzoj en Israelo, ili plejparte kontraŭstaris la limigojn kaj organizis grandajn kuniĝojn, kiel geedziĝajn festojn

kaj funebrojn. Kelkcent mortis, inkluzive gravajn ĥasidajn gvidantojn. Sed samtempe kreskis kolero kontraŭ la ĥasidoj kiel virus-dis-vastigantoj.

Ankaŭ en la Eŭropa Unio, religio ne ludis grandan rolon en la disvastigado de la viruso. Tamen escepto estas **Francio**, kie kvintaga evangelia kuniĝo en februaro arigante 2500 homojn fariĝis unu el la plej grandaj bredejoj de Kovid-infektoj en Eŭropo. Ĝi okazis ĉe la mega-preĝejo Malfermita Pordo Kristana en la alzaca urbo Miluzo (Mulhouse). Oni taksas, ke almenaŭ duono de la partoprenintoj infektiĝis. La franca ministro pri sano diris ke pro tiu amaskunveno la epidemio disvastiĝis tra la lando, infektante milojn. Unu flegistino, kiu partoprenis, plu-infektis ĉirkaŭ 250 el siaj kunlaborantoj. Ĉeestintoj el Korsiko, Franca Gujano kaj Burkinafaso ankaŭ disvastigis la viruson en tiuj lokoj. Oni tamen ne povas kulpigi tiun eklezion pri senzorga aŭ spita konduto, ĉar tiam la epidemio estis nur komenciĝanta en Eŭropo kaj ankoraŭ neniuj reguloj estis anoncitaj kontraŭ ariĝoj. Kiam estroj de la preĝejo eksciis pri infektiĝo, ili tuj informis la instancojn kaj kunlaboris kun ili – kaj kontraste al diversaj kazoj cititaj en tiu ĉi artikolo, ili ne asertis, ke Dio protektos la ariĝintajn kredantojn. Francio estas konata kiel lando de racio, kaj eble ankaŭ la religiuloj estas pli raciaj ol aliloke! (En najbara Germanio, notindas du ekflamiĝoj de la viruso rezulte de diservoj, unu en Frankfurto en majo, la alia en Bremerhaven en junio – en ambaŭ kazoj pli ol cent homoj infektiĝis.)

Fine, ni transiru al **Rusio**, kie la epidemio unue tre malrapide disvastiĝis, sed ekde malfrua marto okazis forta kresko de ĉirkaŭ 1000 kazoj la 27an de marto ĝis 10 000 la 9an de aprilo kaj 100 000 la 29an. La kronviruso havis grandan efikon sur la Ortodoksan Eklezion. Pro vasta rezistado inter la klerikaro al ŝtataj limigoj kaj gvidnormoj, grandaj nombroj da ili, inkluzive altrangulojn, kaj da ordinaraj eklezianoj infektiĝis kaj multaj mortis, speciale sekve de la paska semajno, kiam amasoj ariĝis en preĝejoj kaj monaĥejoj. Patriarĥo Kiril, kiu unue spitis la registaron, alvokis al fideluloj preĝi hejme dum la paska periodo, nur duonsukcese. En 42 el la 85 regionoj de Rusio, diocezoj akceptis registarajn alvokojn



Rusaj ortodoksuloj festas Paskon dum la pandemio.
(Foto de: Aleksej Malgavko / Reuters)

fermi preĝejojn tiuperiode, sed en la cetero, ili restis malfermitaj. En Moskvo, Peterburgo kaj kelkaj aliaj lokoj, la instancoj simple ordonis ilian fermadon. La fama monaĥejo de Triunio-Sergio norde de Moskvo fermiĝis, sed granda amaso da fideluloj devigis ĝin remalfermiĝi kaj sekve centoj infektiĝis, inter ili dekoj el ĝiaj klerikoj. Multaj ekleziuloj en Rusio akre plendis, ke la ŝtato ne havas la rajton limigi preĝej-ariĝojn. Iuj altrangaj klerikoj nomis ŝtatajn ordonojn resti hejme la laboro de la diablo. Grupo da t.n. Kovid-neistoj aburde asertis, ke oni ne povas infektiĝi en preĝejoj. Unu metropolito minacis damnon al tiuj, kiuj obeas limigojn, dum episkopo deklaris ke la sonorigado de preĝejaj sonoriloj sufiĉas por batali la epidemion! En Rusio tutcerte religio estis grava kontribuinto al la finmaja atingo de 400 000 kazoj.

*Artikolo verkita surbaze de ĉefe anglalingvaj retaj novaĵ-fontoj el diversaj landoj kaj la angla Vikipedio. Ankaŭ hispanlingva kaj ruslingva novaĵ-fontoj estis uzitaj.*

**Nyegosh Dube (Pollando)**

ATEISMO

Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo

**Vorto de Redaktoro**

**Pripensigoj**

Dio, religio kaj la kronvirusa pandemio 3

Ĉu la diablo ekzistas? 6

La ĉapelo 8

Kial Dio ne plenumas dezirojn 10

**Ateisma kaj Laika Vivo**

Humanisma funebro en la kronvirusa tempo 11

Laikaj festoj kaj d-ro Ambedkar 14

Reagoj al la ideo de "maldiservo" 17

Budhismaj temploj en la japana sekulara vivo 18

Ĉu mi devos translokiĝi? 19

**El la Librobreto**

Ateismaj perloj de antikva Grekio 20

Notoj pri ateologio verko 22

Eksislamanino pri la minaco de islama faŝismo 24

**Ĉirkaŭ la Mondo: Novaĵoj kaj Tendecoj**

Socia distancado en Barato 25

"Pasiva helpo" al sinmortigo aprobita en Germanio 27

Kiel religioj disvastigis la kronviruson 29

Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:

**ateismo.bulteno@gmail.com**

Por informo:

**anna.lowenstein@esperanto.org**

Prezidanto (vakas)

Vicprezidanto: Dominique Simeone, Francio

Sekretario: Anna Lowenstein, Britio

Kasisto: Dieter Rooke, Svislando

Enpaĝigo: Jakvo Schram, Belgio

Redaktoro: Nyegosh Dube, Pollando

Jarkotizo: 10€ por A-landoj

8€ por B-landoj

Konto: **ateo-y** ĉe UEA